

### Malsovaĝigado de bestoj utilaj kaj malutilaj.

De Konstantin Mátl, forstisto ĉe abatejo en Rajhrad.

Germane Raigern, fama benedikta abatejo.

Kun speciala permeso de la aŭtoro, tradukis Franz Podloučka.

Posedi malsovaĝigintajn bestojn, kiuj ordinare sovaĝe vivas en la naturo, tio estas kaj estis jam en mia knabaĝo - do daŭre de 46 jaroj - mia plejamata okupado. Mi edukis multajn birdojn kaj suĉulojn, travivis pro tio diversajn, aŭ komike aŭ tragike finiĝintajn okazaĵojn, kaj mi rakontos ilin al la gelegantoj de nia kara *Lovecký Obzor* (ĉasista revuo) laŭ miaj notitaĵoj aŭ laŭmemore.

Unue pri la birdaro.

Estante knabo mi komencis je paseroj. Elnestigita idaro lasas sin eduki rilate facile kaj malsovaĝigi. Ĉefaĵo estas, ke oni ilin ne tro plenigu per furaĝo. Mi ankaŭ provis malsovaĝigi kaptitajn maljunajn paserojn - sed vane; ili konstante restis timemaj kaj kiam mi proksimiĝis al la kaĝo, ili flugante frapis la kaĝvandojn. Malsovaĝigintaj idoj atinginte la flugpovon, estinte ellasitaj, asociiĝis al siaj sovaĝaj kamaradoj kaj forgesis sian bonan vivon, kiun mi estis prizorganta al ili. Nur unun mi sukcesis tiagrade, ke ĝi povis libere ĉirkaŭflugi, revenis laŭ fajfo, lasis sin preni en manon, kaj ke li tranoktis inter la kuirejfenestro. Ĝi finiĝis tragike inter la ungegoj de nia kato, kiu ĝin ekkaptis tra la duonfermita fenestro. Mi venis ĵus ĉe tion, kiam la kato kontente sin lekis kaj kelkaj sur tero kuŝantaj paserplumetoj pruvis la krimon.

Mia doloro estis granda kaj pro tio mi decidis, ke mi punos la katon. Kun helpo de miaj fratoj mi laĉis ŝnureton ĉirkaŭ ĝian kolon kaj voston kaj en la fino de la ŝnureto ni alligis ladan potkovrilon. La efiko estis surprizanta. La kato, timigite per la tintado de la potkovrilo, tute furioziĝis kaj komencis salti, per kio nature la potkovrilo des pli tintis. La kato dis- kaj deĵetis vazojn kaj glasojn, ĝis nia patro, atentigita per la terura bruego, malfermis la pordon, tra kiu ne nur la kato kun la kovrilo sed ankaŭ ni foriĝis - certe la decan porcion de batpuno ni tamen ne evitis. Post nemalgranda klopodo la patro ekkaptis la katon en la kelo, liberigis ĝin de la tintanta alligaĵo; per tio finiĝis ankaŭ miaj unuaj malsovaĝigaj esploroj.

Pli poste mi elserĉis por tio pli grandajn birdojn; elnestigitajn idojn de korvoj, pigoj, monedoj, tinunkoloj kaj strigoj. Da ili mi havis ĉiam kelkajn. Du korvojn mi tre bone bone edukis. Komence ili estis sufiĉe seninteresantaj kaj mallertaj, sed ili lasis sin nutri per ĉio ajn. Korvoj baldaŭ ekkonas sian nutranton kaj jam de malproksime ili lin salutas per raŭka grakado kaj per flugilsvingado. Ambaŭ ĉi korvoj bone progresis, flugadis ĉiam kune kun kaj laŭ fajfo ili tuj respondis kaj flugis al mi; ili tute libere iradis post mi kvazaŭ hundoj, ankaŭ tra la tuta domo, timante nek hundojn nek katojn, kontraŭe, dum renkonto ili traktadis ilin per dolorigaj pikegoj en voston, tiel ke hundoj kaj katoj respektoplene lasis lokon al la korvoj. Tiuj ĉi korvoj tragike pereis.

Mia patro pretiginte planojn (li estis arkitekto) foriris el sia oficejo, lasinte la pordojn malfermitajn. La korvoj, vagante tra la domo, eniris en la oficejon, saltis sur la tablon, renversis tubojn, farbojn kaj ruĝan inkon kaj per piedoj - ŝmiritaj per la farbmiksaĵo - ili iris ankaŭ sur la pretajn planojn ruinigante ilin. Kiam ili plej vigle sin amuzis, revenis la patro. Estas facile imageble, kio sekvis, precipe ĉe la patra kolerema karaktero. En la plej proksima momento ambaŭ korvoj mortante kuŝis sur la planko.

Multe pli viglaj kaj konstante babilemaj estas monedoj. Ankaŭ ili lasas sin facile nutri kaj malsovaĝigi. Mi havis monedojn tre malsovaĝajn kaj babilemajn. Hundojn kaj katojn ĝi pinĉis en voston, kolombojn kaj kokinojn ĝi peladis, sed katojn ĝi tamen nur respektis. Ĝia plej grava malamikino estis nia mastrumistino. Nome, la monedo traserĉis ĉiujn ejojn en nia domo. Kaj trovinte freŝkovitan ovon, ĝi tuj ĝin trapikis kaj eltrinkis, kaj kvazaŭ por moki la mastrumistinon, ĝi venis en la kuirejon, montrante la bekon ŝmiritan de ovoflavo. La mastrumistino daŭre plendis al la patro, kaj mi devis tonde mallongigi ĝiajn flugilojn, por ke ĝi ne povu flugi en la kokinejon. Kaj tio estis ĝia malbona sorto - klukulino ĝin mortpikis per la beko.

Pro tiu ĉi monedo mi multe ploris kaj ĵuris al la mastrumistino krutan venĝon. Kun helpo de miaj fratoj ni kaptis nian blankan kaprinon, la karulinon de nia mastrumistino kaj per nigra farbo mi pentris al ŝi okulvitrojn, kun larĝaj strioj sur la nazo kaj dratfadenoj malantaŭ la orelojn. Ellasinte la kaprinon, ni kaŝis nin en la subtegmenton, avide atendente la unuan renkonton inter mastrumistino kaj la okulvitrumita kaprino. Kaj fakte, ĉi tiu renkonto estis ege grandioza. La mastrumistino venis en la korton kaj la blekanta kaprino rigardis sin superklere tra siaj okulvitroj. La mastrumistino restis stari saliĝinta kolono, kiel la edzino de Lot, poste ŝi rapidis en la domon. Ŝi venigis la patron. Ni ekstremis, malsupren rapidegis de en la subtegmento kaj nur vespere ni enŝteliris en la domon.

Eldemandaro! K i u tion faris? Spite de nia antaŭiranta decidiĝo, la fratoj fingre montris perfide al mi. --- "Nu, tion mi tuj pensis," rimarkis la patro - kaj la afero finiĝis. — Pli malbone fartis la mastrumistino, kiam ŝi klopodis forviŝi la okulvitron de la kaprino, ĉar je tio mi ankaŭ antaŭpensis kaj uzis olean farbon.

Ankoraŭ unu okazaĵo. — Mi havis elnestigitajn idojn de tinunkolo. Tiuj ĉi rabbirdoj junaĝaj estas nebelaj; ili estas kovritaj per blanka lanugo kaj konstante fajfpepas. Ili estas ankaŭ tre glutavidaj kaj nesatigeblaj. Ricevinte plumojn ili bele graciliĝas. Miaj tinunkoloj bone malsovaĝiĝis kaj flugis libere sur tegmentojn. Kiam mi venis hejmen ili kun kriado alflugis kaj eksidis sur miajn ŝultrojn ŝirante per ungegoj mian jakon. Malfacilaĵo estis, prizorgi la necesan nutraĵon por ili. Ses mi havis da ili kaj mi donis al ili ĉiujn atingeblajn paserojn kaj musojn, kaj tamen ĉi tiuj birdoj estis konstante malsataj kaj fajfpepis. Nur perforta memhelpo restigis al mi.

Mi kaptis unun el niaj kokinoj, kaŝe mallongigis ŝian vivon, senhaŭtigis kaj dishakis ŝin, kaj la viandon mi kaŝis en poto en kelon. Nun la tinunkoloj festenis. Post tempo dua kokino estis oferata. Patro kaj mastrumistino serĉis la sekretan malutiliganton. Kaj - fine ĉio klariĝis. La mastrumistino trovis en la kelo poton kun dishakita kokino - kaj venis malbona tempo por mi kaj la tinunkoloj.

Kie estas la tempoj de la ora juneco! La patro jam longe elripozas sur kortuŝanta kaj tre bela tombejo en Rajhrad, kaj la fratoj, - disiĝintaj en la tuta mondo. La mastrumistino - kaduka maljunulino - renkontante min, ĉiam memoras ankoraŭ la kaprinon kun okulvitroj.

Pleje mi preferas pigojn. Ili plaĉas al mi pro sia vigla temperamento kaj alta inteligenteco, ankaŭ pro sia bela aspekto. Ne estis malfacile ilin nutri. Precipe unun el ili mi bone edukis. Ĝi estis tre malsovaĝa, flugis en la domo kaj en la ĉirkaŭaĵo. Vokite ĝi grake respondis kaj tuj alflugis. Ĝi tre ŝatis muzikon per buŝharmoniko. Tuj kiam mi komencis ludi, ĝi alflugis, eksidis apud min aŭ sur la pinton de miaj botoj kaj senmove sidante kun flankenklinita kapo, ĝi trankvile aŭskultis kaj kontente, mallaŭte babilis kun si mem. Fingringojn, kudrilojn, najlojn kaj precipe ĉion, kio briletis, ĝi forportis en la subtegmenton malantaŭ trabon.

Frato purigis biciklon kaj elpreninte la globolagron, li kuŝigis ĝin sur la tablon. La pigo alŝteliris, ekkaptis ĉiujn globetojn sed ne englutis ilin, oni vidis, kiel ili konturiĝis sur la malsupra parto de makzelo. Kio nun? Rapide mi alportis pecon da hepato, ĝia plej preferata delikataĵo. Vidante hepaton, la pigo tuj elkraĉis la globetojn sur la tablon kaj ekprenis la hepaton. Tiu ĉi pigo kopiis la klukadon de kokino, pepadon de kolombidoj kaj diversajn aliajn sonojn, kiujn ĝi aŭdis en la korto. Iun vintrotagon estis al mi frapanta, ke la jam sata pigo, ekkaptinte pecon da nutraĵo, forflugis en la ĝardenon. Mi sekvis ĝin kaj kun miro konstatis, ke mia pigo alportis la pecon al sovaĝa pigo alfluginta el proksima arbaro. Kaj tiamaniere ĝi kondukis la tutan vintron. Neordinara kazo pri birda solidareco.

Se mi longtempe ne eliris el la domo, ĉi tiu pigo alflugis al fenestro kaj frapis sur la fenestrovitron tiel longe, ĝis mi ĝin enlasis aŭ eliris al ĝi eksteren. Ĝi finiĝis malgajige, estinte mortpafita de ĉaskomencanto - kaj alia pigo jam tiel bone ne prosperis. \_

Mi preterlasas paroli pri strigoj, kiuj ankaŭ en kaptiteco estas malafablaj kaj pasigas la tutan tempon en malhela angula de la kaĝo. Mi volas mencii ankoraŭ unu rabbirdon, kiu estis plej granda el ĉiuj de mi edukitaj. Estis k i r k o, kiun mi ricevis la 13an de julio 1921. Mi ĝin havis en granda kaĝo en ĝardeno. Tiu ĉi birdo estis eksterordinare manĝema kaj mi donas laŭ mia taglibro kelkajn datojn, por ke la legantaro mem povu juĝi la manĝemon: Ĝi manĝegis la 13an de julio: 1 paseron, 2

katidojn kaj pecon da hepato. - 14an de julio: du katidojn, duonan pigon. - 15an de julio: unu sciuron, duonan pigon, anasidon, k.t.p. - Malgraŭ ŝajnis, ke ĝi estas konstante malsata. Komence de septembro mi donis al ĝi liberon. Ĝi restis en ĝardeno, sur la domoj kaj timigis la dombirdaron kaj, forfluginte, ĝi estis mortpafita de alvokita ĉasisto.

Interesan kazon mi havis kun ralo, kiun oni alportis al mi la 3an de julio 1923. Kun nesto, en kiu estis kvin ovojn kaj tri ĵus naskitaj idoj. Ĉion mi donis en grandan kaĝon kaj ĉirkaŭ la nesto mi, per helpo de kelkaj herboj kaj kano, ŝajnigis herbejon. Al mia miro la ralo tuj en la neston eksidis kaj ne lasis sin per io ajn malhelpi. En la proksima tago estis en la mondo 8 ralidoj. Ĉi tiun tutan familion mi ellasis sur la herbejon. Malofta montrado pri eksterordinara birda zorgemo pri nesto kaj idoj.

Fazanojn, perdrikojn kaj sovaĝajn anasojn, kovitajn el ovojn, kiujn oni trovis dum falĉado de herbejoj kaj kiujn mi metis sub domkokinon, mi prefere edukis. Fazanoj estas treege delikataj, kiel idoj malrapidemaj kaj mallertaj. Perdrikoj estas multe pli viglaj kaj pli facile nutreblaj. Kvin fazanoj (4 inoj kaj 1 virfazano) edukitaj kun doma vir-koketo, ĉiam promenadis kune. Ili estis tute malsovaĝaj, alflugis laŭ mia fajfo kaj noktumis kun la doma kokvireto sur abrikotarbo en la ĝardeno, ankaŭ dum la vintro. Sed al la kokvireto frostiĝis kresto kaj piedoj. En komenco de la printempo la fazanoj transloĝiĝis en la proksiman fazanejon kaj ne revenis plu.

Da perdrikoj estis 12 kune el unu nesto; ili trakuris la tutan ĝardenon, superflugis la barilon, sed antaŭ vesperiĝo ili ĉiam flugis hejmen kaj per si mem rapidis en la kolombejon, sian edukejon, kaj tie premite unu al alia ili dormis. Ricevinte la tiel nomatajn o r a j n p l u m o j n, ili forflugis kaj ne revenis plu.

Da sovaĝaj anasoj estis naŭ. Estante anasidoj ili estis tre timemaj kaj daŭris longe, ĝis ili kutimiĝis al mi, sed poste ili fariĝis tre fidemaj. Mi preparis por ili ĉirkaŭbaritan lokon en la ĝardeno kun artefarita malgranda lageto el junko kaj kano. Pasie ili manĝis lumbrikojn. Kiam ili ekvidis min kun fosilo, ĉiuj kuris, la koletoj streĉitaj renkonte al mi, kaj dum la fosado mi devis treege atenti, ĉar unu super alia falegis sub mian fosilon sur ĉiun aperantan lumbrikon.

Komika aspekto estis, se du anasoj batalis pro unu lumbriko; ĉiu tiris la lumbrikon ĉe unu finaĵo, ĝis ili ĝin disŝiris kaj renversiĝis sur postajon. La anasoj bone prosperis kaj nur en la aŭtuno, kiam ili ricevis vintran plumaron, mi konstatis kun miro, ke el ĉiuj naŭ anasoj estis sep vir-anasoj kaj nur du anasinoj. Ĉiuj finiĝis tragike. Ilian kabaneton, en kiu mi ilin por nokto enŝlosis, mi kovris per nova gudrokartono. Dumnokte pluvis. Proksiman tagon mi kun teruro konstatis, ke la anasoj estis malgajaj, ilia plumaro malglata: ili nenion manĝis kaj mortis unu post alia. De la nova gudrokartono defluis la akvo en la drinkujon kaj delavis tien la venenigan ŝtofon de la gudro. La akvo en la drinkujo estis kovrita de grasaj makuloj - do, la anasoj veneniĝis.

La nutrado de la idoj de utila birdaro, escepte anasojn - estas tre malfacila. Precipe fazanidoj estas tre delikataj. Mi ilin nutris per kuiritaj ovojn, kaj en la unua tempo nur per albumeno maldike hakita kaj miksitaj kun juna verda herbaro. El ĉio ili plej preferis formikojn kaj formikajn larvojn. Rekomendinde estas, ke oni lasu ilin kiel eble plej baldaŭ kuri kun la klukkokino en la ĝardeno. Por la naskado de la fazanoj taŭgas plej bone la liliputanaj kokinoj, ĉar ili estas malpezaj, poste, ĉar ili estas tre zorgemaj pri la fazanidoj, konstante piedgratas nutraĵon por ili kaj kunvokante ilin al nutraĵo. Sola malprofito de tiuj ĉi kokinoj estas, ke oni povas nur malmulte da ovojn submeti sub ilin. Por la nutrado de pli aĝaj de ĉi tiuj birdoj, mi pretigis jenan nutraĵon. Mi senhaŭtigis ses mortpafitajn korvojn, kaj elliginte la internaĵon, mi ilin kuiris, poste, kun la ostoj malgrandpece dishakis. Poste mi kuiris korbon da limakoj, kuiritajn mi ilin eltiris el la konkoj, dishakis ilin ankaŭ kaj miksis kun la dishakitaj korvoj. Al tiu miksaĵo mi aldonis tiom da titrikaj branoj, ĝis fariĝis rigida pasto. La paston dispremite je maldikaj pecoj, mi sekigis. La sekigitajn mi dispecigis - plej bone estas froti ĝin per frotilo - malsekigis la pecetojn per akvo tiel longe, ĝis ili ŝvelis kaj moliĝis, kaj tiel preparitaj, mi ilin donis al la birdoj.

- La birdoj kreskis, estis sanaj kaj gajaj. Ĉefaĵo estas, ke oni ne tro nutrigu la birdon, oni ŝutu al ili pli malmulte sed pli ofte kaj ĉiam je destinita horo. Estas tre bela aspekto, se laŭ fajfo alflugas de unu flanko perdrikoj, de alia flanko fazanoj - kaj al fajfo la birdoj al kutimiĝas jam en la plej juna aĝo ĉe nutrado.

Al la sovaĝaj anasoj oni de tempo al tempo tondmallongigu la flugilojn, por ke ili ne forflugu sur riveron. Sed mi havis paron da ili, kiuj ankaŭ de sur la rivero revenadis. Ĉi tiun paron mortpafis unu el ĉi tieaj ĉasuloj kaj laŭdis, ke la anasoj trankvile elatendis, ĝis li deŝultrigis la pafilon. Post kiam mi montris al li la signon, eltonditan en la naĝmembrano de la anasoj, li rigidiĝis.

-0-0-0-0-0-0-0-0-

Kaj nur ion pri la malsovaĝigado de suĉbestoj.

La unuaj estis dommusoj. Mi ilin havis inter la fenestroj, pri kio malmulte ĝojis la mastrumistino. La musetoj vigle kuris tien kaj reen, drinkis tre volonte lakton kaj ŝmiris la fenestrajn tabulojn, se ne montris simpatian kontraŭ mi.

Poste mi okupis min je sovaĝaj kunikloj, kiujn mi elnestigis en ilia plej juna aĝo. La kunikloj bone malsovaĝiĝis kaj estis tre petolemaj. Ankaŭ leporojn mi edukis, do tiuj restis longe timemaj kaj multe ne prosperis. Ankaŭ kapreolidon pro malvarmo rigidiĝintan, mi alportis el la arbaro hejmen. Li en varmo resaniĝis, post mallonga tempo alkutimiĝis kaj drinkis lakton el la plado. Dum tago li kuris en la parko, por nokto li estis enŝlosata en stalo.

Li fariĝis forta virkapreolo kaj eĉ dukornulo. Pro malutiligo de arboj kaj ankaŭ pro tio, ĉar li atakis homojn, li estis donata en bestparkon. Mi supozis, ke li tie malsovaĝiĝos. La virkapreolo en la parko restadis sur la rando apud la vojo kaj devis esti mortpafita. Ankoraŭ unu kapreolidon mi alportis el la arbaro en forstistan domon, kie Ella, la filineto de s-ro superforstisto, prizorgis lin; li montris sin tre sindona al ŝi, akompanis ŝin en la tuta domo kaj por elriprozi, li ĉiam kuŝigis sin antaŭ ŝiajn piedojn.

Ĉar la virkapreolo devenis el libera arbaro, la superforstisto intencis ellasi lin, ĝis kiam li plenkreskos, en la bestparkon, por ke li tien alportu freŝan sangon. Sed mi, kiam sinjoro ĉefo kun familio forvojaĝis por kelkaj tagoj, sekrete kastrigis la virkapreolon de hazarde preteriranta kastristo. Estis maljuna, sperta viro, kiu min certigis, ke la kapreolo bone eltenos la operacion kaj baldaŭ resaniĝos. Kaj fakte, la kapreolo eĉ ne iomete estis malgaja kaj neniu povis konstati ion je li.

Sinjoro superforstisto konstante diradis, kia bono estos, tia freŝsangulo por la bestparko, kaj mi estis sciema, kian influon la kastro havos je kornoj kaj karaktero de la virkapreolo. Sed - neniu el ni estis kontentigita. La pordego de la lignejo, kie la kapreolo vivis, restis malfermata, la kapreolo eliris sur la straton kaj estante forpelita de hundo aŭ de preterveturanta veturilo, forkuris kaj por ĉiam malaperis. Vanaj estis la tondroj de s-ro superforstisto kaj la kortuŝantaj plendegoj de fraŭlino Ella. La kapreolon verŝajne ekposedis iu bonfaranto, kuiris lin kaj manĝis kun terpomo.

Ankoraŭ mi volas rakonti mian spertaĵon kun sciuro kaj interesan okazaĵon kun erinaca familio. Tre junan sciurinon mi elnestigis en arbaro kaj alportis hejmen, kie mi ĝin en la ĉambro donis en grandan kaĝon. Ŝi estis tre vigla. Super ĉio ŝi amis lakton, manĝis nuksojn kaj migdalojn, sed mordetis ankaŭ maizon. Ŝi baldaŭ malsovaĝiĝis kaj fariĝis tre sindonema. Mi ŝin ellasis el la kaĝo, kaj ŝi kuradis en la ĉambro, petolis en la lito, certe estas, ke ŝi kelkfoje ion deĵetis aŭ renversis. El la fenestro en la unua etaĝo mi alfiksis stangon sur abion, kie ŝi forpeladis paserojn. Per la stango ŝi iradis en la kaĝon en la ĉambro.

Mi ricevis novan ĉashundon - akreharhavan perdrikhundon. Kvankam la sciurino ne timis miajn hundojn, je tiu ĉi nova hundo, postkuranta min en la ĉambron, ŝi tiom ektimis, ke ŝi saltebatis sin en la kaĝo. Por trankviligi ŝin, mi malfermis la kaĝon kaj fenestron: La sciurino tuj elsaltis el la fenestro, do ne sur stangon, sed rekte sur teron, forkuregis tra la ĝardeno, transkuris per ponteto la riveron, malaperis en la arbaron kaj mi ŝin neniam plu vidis.

En arbara herbejo dum falĉado la falĉistoj trovis en la 3a de Junio 1925 erinacinon. Ŝi estis en volvaĵo de herbo kun ses ĵus naskiĝintaj idoj. La idoj estis tre gracilaj estaĵetoj, tute blankaj kun mallongaj molaj pikilharoj. La tutan donacaĵon mi alportis hejmen kaj loĝigis ĝin en la kavaĵo sub la fajrujo en la kuirejo, por ne malgranda ĉagreno de sinjorino forstedzino, kiu ion rakontis, ke mankas al ni ankoraŭ nur krokodiloj, alie nenio.

Mi aranĝis por la erinacpatrino kuŝejon el fojno kaj ŝi tuj kun siaj idoj envolvis sin. Donitan lakton ŝi tuj drinkis plezure ŝmacante. Ŝi multe amis mielon; senhaŭtigitan paseron ŝi kun apetito manĝis, tielsame hepaton. Tre bela aspekto estis, kiam ŝi kuŝiĝis dorsen, kaj ĉiuj ses idoj sur ĉiu flanko tri, alsuĉiĝis, kiel porkidoj.

Poste ŝi grupigis sin kun la idoj ĉirkaŭ la plado da lakto, kiun ili ĝis la lasta guto ellekis per siaj rozkoloraj langetoj. Baldaŭ ili elkreskis je duono de plenkreskeco, griziĝis, la pikiloj malmoliĝis kaj akriĝis. La erinacpatrino kondukis ilin tra la tuta kuirejo, ilia piedfrapado estis aŭdata dum la tuta nokto. Ke ili ne malmulte malpurigis la kuirejon, estas kompreneble - kaj la malodoro!

Ĉar la konstanta murmurado de la sinjorino forstistedzino komencis min tedi, mi prenis la tutan familion kaj transloĝigis ĝin en la ĝardenon; tie mi ĝin donis en grandan senplankan kaĝon. Matene la erinacoj estis for. La erinacino dumnokte subfosis la kaĝon kaj forkondukis ĉiujn idojn kun si. Estis bela, tre bela idilio el vivo de la erinacoj.

La malsovaĝigado de bestoj efikas multan distron kaj agrablan amuzon, donas eblecon, atingi ideon pri ili – malpligranda mezuro de inteligenteco, edukemeco, pri kutimoj kaj emoj de la bestaro, kion oni ne povas sekvi kaj ŝati observante la bestojn vivantaj en libereco.